

# kontakto

*tutmonda  
esperantista  
junulara  
organizo*

**N-ro 3**

**Volume 3/1966**

# kontakto

N-ro 3

Volumo 3/1966

Revuo de Tutmonda Esperantista  
Junulara Organizo  
(Junulara Sekcio de UEA)

Kelkfoje oni povas nur miregi, se oni — rigardante kaj meditante nian kompleksan nuntempo — renkontas tiel imense kontraŭajn faktojn kiel ilin servas la hodiaŭa mondo. Jen oni estas jam preskaŭ sur la luno kaj faras sciencajn miraklojn, sed jen oni ĝis hodiaŭ ne trovis taŭgajn kuracilojn kontraŭ simpla, ordinara nazkataro (kiun momente mi ĝuas laŭ ĉiuj fazoj) Jen oni havas komplete aŭtomatajn kuirejojn kaj planas supermodernajn urbejojn, sed jen ni ne sukcesas satigi eĉ nur la plimulton de la homaro, kaj milionoj da samtempuloj vivas en kabanaĵoj sub higiene ne imageblaj kondiĉoj. Jen oni kunsidas senpaŭze en ĉiaj nur penseblaj konferencoj kaj ĉiun tagon faras paŝojn sur la vojo al enorma kuniĝo de la popoloj, sed jen estas senĉese militoj kaj malamikeco inter raso kaj gentoj. Jen ĉiu kaj ĉiuj laŭte postulas la pacon kaj solidaran kunvivadon, sed jen oni devas serĉi per mikroskopo la landon, kie ekzistas nenia diskriminacio. Jen preskaŭ ĉiuj ŝtatoj subskribis la deklaron pri la homaj rajtoj, sed jen la samaj ŝtatoj ĉiutage evidente malatentas ilin.

Nu, mi povus longe daŭrige en tiu senco por montri la senlogikecon kaj malprudentecon de nia jarcento. Sed kiuj estas la kaŭzoj de ĉi tiu tiom stranga — milde dirite! — situacio?

Verŝajne oni povas respondi tiun demandon plej diverse kaj varie, nur absolutan respondon aŭ klarigon ni supozeble ne trovos, ne ĉe la grandaj filozofoj, ne en la potencaj ideologioj, ne ĉe la gazetoj kaj ne ĉe la best-seller-aŭtoroj.

Prefere ni esploru la homon

mem. Ĉar li, tiu estulo tiom mistera, neniam plene komprenebla, estas fidela spegulo de ĉi ĉio, kion mi supre skizis. Esploru mem vian koron, kaj vi trovos, ke en ĝi regadas la samaj kontraŭdiroj — nur la skalo estas pli malgranda.

Inverse do: en la homaro sumiĝas kaj densiĝas tiuj kontraŭdiroj tiel grandskale kaj potence, ke ni individuoj ne povas eskapi.

Tio nun ne signifas, ke ni simple akceptu ĉiujn malbonaĵojn sen protesto. Male: ĉar do estas tiel ke tiuj kontraŭdiroj sumiĝas, ankaŭ estas eble, ke sumiĝas la prudentaĵoj, kaj la sumiĝon kaj densiĝon ni povas akceli, se ni — individuoj kaj grupoj — laŭte kaj des pli ofte diras nian (prudentan kaj logikan, bone argumentitan) opinion. Oni ne subtaksu protestojn, demonstraciojn ktp. Kaj oni ne subtaksu la valoron de konstanta edukado de niaj kunhomoj. Sed por tio ni mem devas esti „edukitaj” aŭ almenaŭ konsciaj. La minimumo: diskutado. Ni zorgu, ke neniam oni simple kaj ignore preteriru la problemojn. Stef

Redaktoro: Stefan Maul, Hubertusstr. 2a, 625 Limburg/Lahn, Germanio - Desegnisto: Jan Schaap - Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn abonkotizojn, reklamojn ktp.: Kontakto, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando - Prezo: 8 ned. gld. = 32 steloj (jarabono de minimume kvar numeroj); 2.20 ned. gld. = 9 steloj (individua numero) - Bankisto de UEA: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1, Nederlando - Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, tel. (010) 25 66 45 - Reklamtarifo: La redakcio liveros kontraŭ peto. Speciala malalta tarifo por esperantistaj entreprenoj.

## ENHAVO

Psikoterapeŭtiko de la familio	3
Programo D	5
Monda enloĝantaro daŭre plimultiĝas	6
Erarvagantoj el Glacimaro	7
Kelkaj intimaĵoj al knabinoj: ĵaluzo	8
Niaj humoristoj: Raymond Schwartz	9
Espero por malsanaj koroj	10
La plej konataj trafikaviadiloj	13
La cirko mortis - vivu la cirko!	14
Mozaiko	16

## NIAJ KONTRIBUINTOJ

La studenton pri psikoterapeŭtiko tradukis por ni *Ruben F. Gonzales* el Rosario. - Programo D estigis laŭ raporto de germana radio-ĵurnalisto. - *Humphrey Tonkin* liveris la artikolon pri malsato, kiu kompletigu niajn artikolojn en la antaŭa numero. — Pri la "erarvagantoj" skribis la redaktoro mem, dum la aŭtorino de la ĵaluzo-artikolo volas resti anonima por ne vekti ĵaluzon. — *Raymond Schwartz* estas tiel konata, ke apenaŭ ni devas prezenti lin, la kabaretiston kaj humoriston, kiu per sennombraj poemoj dum la jaroj ĉiam denove pruvigis sian ridigan talenton. — La artikoleton pri la modernaj kuracmetodoj ĉe kormalsanoj liveris al ni *US-Artikolservo*.

## FOTOJ

FAO (1), ZDF (6), PK (4), US-A (4).



D-ro G. Baremblit

## Psikoterapeŭtiko de la familio

La studado de la homa sinteno akiris hodiaŭ plej grandan signifon. Kiam la sciencaj esplorantoj kaj enketantoj pri homsinteno komencis asigni malpli da graveco al la heredo kaj pli al la ĉiutagaj vivospertoj, oni konsideris la familion fundamenta estiganto, tial ke ĝi estas scenejo de la plimulto de tiuj spertoj.

Oni povas diri ke homsinteno en ajna aĝo en siaj mensaj, korpaj aŭ sociaj aspektoj estas ekzercado de "mekanismo" (konscie aŭ senkonscie) lernita en iu ajn momento de la longa kaj kompleksa vojiro de utero ĝis morto.

Sed la grado de akceptemo kaj lernkapablo estas ege pli granda en la unuaj vivetapoj, kaj ĉar tiuj etapoj pasiĝas preskaŭ ekskluzive en la familia kunvivado, tiu kunvivado estas ege signifa. La formiga funkcio de la familio ne reduktiĝas al tio vole liverata de la gepatroj al la gefiloj. Ekzemple la interagoj en familia kunvivado estas plurnombre senkonsciaj, ne rimarkataj de la membroj, kaj la rezultaj kondutoj estas multfoje malaj al tiuj kiujn oni deziras.

Normala psiksinteno estas kulmino de la harmonia disvolviĝo de tiuj unuaj periodoj. Harmonia disvolviĝo ne postulas neekzistadon de familiaj konfliktoj, sed adekvatan solvon de ili ĉiuj. Ankaŭ mensmalsano estas senpera konsekvenco, kvankam ne nura, el misrilatoj en la familikerno.

#### *Funkciado de la familio*

Riskante troan simpligon, oni povas tiel difini la strukturon de la familia vivo: organismo, en kiu ĉiu membro-organo devas plenumi funkcion intimirate al la aliaj. La tuta tasko plenumenda celas pluvivadon kaj kreskon de la organismo.

Por ke ĝi estu ebla, la familistrukture devas daŭre kaj aktive adaptiĝi al la ĉirkaŭaj kondiĉoj biologiaj, ekonomiaj, politikaj kaj sociaj. Ekzemple pliigo-malpliigo de aĉetkapabloj kaj konsumbezonoj, ŝanĝoj de sociprestiĝo, geografia logiĝo ktp. Ĉiu ŝanĝo estigas bezonon kontentigeblan nur per interna reorganizo, reekvilibriĝo, supozeble ĝis nova misniveliĝo. Krom tiu rilato inter familio kaj aliiganta medio estas bezonata la daŭra reordigo, kiun postulas la internaj ŝanĝoj: naskiĝo, kresko kaj morto de la membroj ktp.

Ĉiu membro havas por ĉiu kompleksa aŭ simpla tasko kondutaron, kiun la aliaj, dirite aŭ silente, esperas de ĝi. Tiu kondutaro devas harmonii ankaŭ kun tiu, kiun ĝi esperas de la aliaj.

Se unu membro ne plenumas sian propran funkcion, ĝi estas plenumata, konscie aŭ senkonscie, de la ceteraj; aŭ inverse, se la plimulto ĝin ne plenumas, ĉiuj funkcioj falas sur la ŝultrojn de unu el la membroj, precipe dum multnombraj aŭ egaj ŝanĝoj internaj aŭ eksteraj (ekonomiaj ruiniĝoj, mortoj, milito, seksa miskonduto de unu el la filoj, tro limigita buĝeto k.s.).

La situacio tiel povas esti superata, se ĝi ne estas tro grava aŭ se la aktivaj membroj restas fortikaj. Kontraŭe tio, kion oni povus nomi la "familimenso", freneziĝas pro la malhelpaĵo kaj mismaniere strebas daŭrigi la unuecon de la organismo, permesante ke unu el la membroj ŝarĝiĝas kun ĉies malsanoj. Same kiel ĉe la korpo mem, la familio ĉirkaŭas lin per psikologia ŝelo de senkomunikado aŭ rekte lin forpelas. Tiu membro estas la mensmalsana.

#### **EKZEMPLO**

Ni imagu familion kaj faru apartan enfonkusigon de ties problemoj:

Geedzoj sen infanoj. Ambaŭ nematuraj. Li senkonscie funkcias kiel ŝia "patro", kaj ŝi kiel lia "patrino". Ili atingis ekvilibron vivante unu por alia en stato de nereala adoro. Ilia preteksto por la manko de gefiloj estas la malalta salajro.

Subite li estas avancata kun granda pliigo de enspezoj. Malaperas la preteksto, ŝi deziras gravediĝon. Li obstine neas, sed nekonvinke. Bebo naskiĝas. Ŝi sentas ĝin pli multe taŭga por absoluta idilia unuiĝo, malatentas sian edzon kaj anstataŭe troatentas la fileton. La edzo, soleca kaj kolera, kanalizas sian gratif-avidon al amatino (tute senkonscie), evitante tiamaniere rektan agreson al edzino kaj fileto, kiujn li amas. Li tiel ankaŭ evitas ke lia konflikto de amomalamo finfine lin mem frenezigus.

Sed la edzino perdis la "patredzon". Tio konfliktigas ŝin kaj ŝi mise kulpigas la infanon pro sia malfeliĉo. Laŭvice ŝi troŝarĝas la infanon per amo kaj regalo aŭ ĝin flankigas, kvazaŭ ĝi estus uzurpulo kiu forprenis la "patredzon" de ŝi. Tiel la infano konsterniĝas kaj konfuziĝas tiom ke ĝi psiko-

ziĝas. Oni devas ĝin internigi en hospitalon. Tie ĝi estas ame vizitata de la reunuiĝintaj gepatroj (ja forpelita la uzurpulo).

Ili denove estas la poreterne sindorantaj geturtoj. La streboj por reenirigi la infanon en la familion estas energie (kvankam senkonscie) rezistotaj.

Ĉu aliaj eblecoj? Jes, uzante la saman ekzemplon: Povus okazi ke la gepatroj neus la malsanon de la infano: "Kiam ĝi estos pli aĝa, tiam ĉio forpasos." Aŭ la geedziĝo povas esti neniigita, dum daŭras la malsano ĉe la ligiloj inter la patrino kaj la infano, kaj inter la edzo kaj la amatino.

Tiuj ekzemploj estas ekstreme simplegaj. En pli grandaj familioj, preskaŭ en ĉiuj kazoj, la roloj, karakteroj, reciprokaj influoj malsanigaj estas ege komplikaj kaj diversaj.

La rezultaj malsanuloj povas esti kelkaj, eĉ okazas en iuj familioj ke la membroj laŭvice malsaniĝas. Kelkfoje la internigo aŭ sinmortigo de la malsana membro, kiu portas kun si la malsanon (en la fantazio de siaj gefamilianoj) lasas la aferon en ŝajnekvilibro. Sed ankaŭ povas okazi ke malgraŭ malapero de la ulo de la tensioj, tiuj redisvastiĝos en la familio. Estas do necese produkti novan frenezulon aŭ la freneziĝo okazas en la tuta grupo.

Ĉi ĉio igas ke la psikiatroj kaj psikoterapeŭtoj ĉiam pli kaj pli ekzamenas, diagnozas kaj kuracas la mensan malsanulon kune kun slia familio. Ne estas maloftaj malsimilaj diagnozoj laŭ diversaj psikiatroj, tial ke malsimilas la ŝanĝiĝoj spertitaj de la pacientoj ekzamenitaj solaj aŭ kun siaj gefamilianoj. Pacientoj intervjuitaj solaj, ŝajnas preskaŭ sanaj sed aperas kiel frenezuloj, observitaj kun siaj apuduloj: Inverse, pacientoj ŝajne frenezaj, aperas multe malpli difektitaj kontaktante kun la familio, sed vidiĝas iam ke eĉ la membroj, kiuj petis la konsulton por la malsanulo, montras evidentajn signojn de mensmalsano.

# PROGRAMO D

## Raporto el Israelo, lando de la 52a UK (1967)

La "eteran militon" inventis la nazioj. Ĝi ne foriĝis kun ili; male, de post tiam ĝi apartenas al la militoj (varmaj kaj eĉ pli malvarmaj), la atako kaj defendo el radistaciaj turoj.

Tia milito estas ĉiutaga ankaŭ ĉe Kol Israel (Voĉo de Israelo), en la fama "Programo D".

Ĝia direktoro estas Jakov Hazma, advokato kaj ĵurnalisto el Irako. La stabo ampleksas 120 personojn, inter ili 28 arabaj parolistoj. La staci-lingvo estas araba laŭ Korano, escepte de certaj programeroj por la enlando, por kiuj oni uzas arabajn dialektojn.

"Programo D" elsendas ĉiutage ĉirkaŭ 7 1/2 horojn je la oportunaj tempoj kaj estas konceptita por la araboj en Israelo mem kaj en la arabaj ŝtatoj. Tial ĝi, kiel sola el la 4 diversaj programoj de Kol Israel, eliras tra du mez- kaj du kurt-ondoj. Pagita ĝi estas kompreneble de la registaro. La kontakto kun la eksterlanda ministrio estas tre intima, nuntempe aparte atentita de ambaŭ flankoj,

Diagnozo kaj terapeŭtiko de la grupo familia jam plibonigis tre favore la prognozon de mensaj malsanuloj; ĝi ankoraŭ estos multe plibonigita laŭ la perfektigo de la tekniko kaj precipe kiam la gefamilianoj de mensaj malsanuloj ekvidos siajn proprajn frenezecojn anstataŭ "suferi sindone" pro unu malsanulo.

Tradukis el la argentina revuo "Niaj Gefiloj" julio 1965 Ruben Feldman Gonzalez

ĉar ministro Abba Eban, studinta cetere en Oksfordo, parolas perfekte la araban lingvon kaj bonege konas la araban literaturon. Ke "Programo D" estas aŭskultata en la arabaj ŝtatoj, ja volonte ricevata kaj forte influas la publikan opinion, tion firme kredas direktoro Hazma. Pruvas tion:

■ la arabaj gazetoj, kiuj jam la saman vesperon aŭ postan matenon kuŝas sur lia skribtablo, ĉar ili daŭre diskutas kun Kol Israel;

■ la arabaj politikistoj, kiuj daŭre referencas al informoj kaj komentarioj de "Programo D";

■ la arabaj radiostacioj, kiujn aŭskultas speciala israela servo;

■ raportoj de enmigrintoj kaj fine

■ la leteroj de aŭskultantoj, 40-50 monate, kiuj atingas Kol Israel ofte laŭ simplaj, pli ofte laŭ tre nekutimaj vojoj.

Oni scias ke la araboj loĝantaj en Israelo unualoke aŭskultas egiptajn staciojn kaj nur kvaraloke "Programon D", sed en la arabaj ŝtatoj sur la unua loko staras "Programo D". Por tion ĝuste prijuĝi, oni devas scii, ke nur la egiptaj stacioj jam elsendas ĉiutage ĉk. 200 horojn en aro da programoj kaj ke 3 egiptaj televid-programoj sendas 30 horojn kaj ke egiptaj kaj libanaj televid-programoj estas ricevataj de multaj enloĝantoj de Israelo, kiu ankoraŭ ne havas propran televidon.

La kompreneblan demandon, ĉu liaj elsendoj ne estas ĝenataj per bru-stacioj, Hazma neas: Israelo ne havas kialon komenci ĝenadon, kaj la arabaj ŝtatoj ne povas komenci, ĉar ili nur ĉagrenus la proprajn aŭskultantojn.

"Programo D" konsistas je 60 %

el parolo. La ondomilito okazas ĉefe en la ĉiutagaj 1 1/2 horoj da informado, en la du ĉiutagaj politikaj komentarioj, en la dufoja (semajne) "P.O.B." (la poŝtfako), dum kiu oni respondas leterojn de aŭskultantojn, en la serio "Vero kaj mensogo" (dufoje semajne) kaj en "Fenestro al Meza Oriento".

"Sed kio kaj kiel estas," akcentas Hazma, "ni neniam atakas; nia taktiko estas defendado." Laŭ li la plej interesa serio estas "P.O.B."

Alvenas tri kategorioj de leteroj. 1e la konsultaj. Ekzistas preskaŭ nenio, pri kio oni ne petas informojn. Precipe temas pri agrikulturaj, komercaj, dom-ekonomiaj kaj medicinaj demandoj. En la respondoj aŭtomate montriĝas la ekonomia supereco de Israelo. 2e la kritikaj kaj atakantaj leteroj. 3e la sugestaj, kiuj traktas temojn tabuajn en la landoj de la sendintoj.

"Vero kaj mensogo" okupiĝas pri la alta politiko. Plej grava helpaĵo estas la arkivo: Kion diras Nasser hodiaŭ pri la soci-produkto de sia lando, pri la Jemen-milito, pri la arme-potencoj de Israelo resp. Egiptio, pri sia milit- kaj pac-emo, kaj kion li diris antaŭ kelkaj jaroj? Citaĵo apud citaĵo. Al kiu Nasser, la tiama aŭ la hodiaŭa, oni kredu?

Sed ne ĉio estas etera milito en "Programo D". La elsendoj destinitaj por la araba minoritato en Israelo estas propra kompleta programo kun ĉiuj klasikaj eroj. Dimanĉe oni eĉ sendas diservojn de 1-1 1/2 horo, alterne por ortodoksoj, katolikoj, protestantoj kaj mahometanoj, kiuj povas aŭskulti ankaŭ ĉiun matenon preĝon el la Korano. Dum la fastmonato Ramadan krome oni elsendas grandajn religiajn solenaĵojn. RS

## MONDA ENLOĜANTARO

La monda enloĝantaro atingis 3,308 (usonajn) bilionojn meze de 1965, indikante pojaran kreskon de 2 procentoj. Se la nunaj emoj daŭros, la monda enloĝantaro superos 7 bilionojn en la jaro 2000. Sep okonoj de la enloĝantara plimultiĝo dum la venontaj 35 jaroj

de 16 ĝis 22 en la okcidentaj industriaj landoj.

En 1965 estis 125 milionoj da naskoj en la mondo kaj 60 milionoj da mortoj — proporcio de proksimume 2 naskoj kontraŭ unu morto. Belgio, kun "maljuniĝanta" enloĝantaro kiu kreskas malra-

ko aperis en 1965 World Population Data Sheet (Informfolio pri Monda Enloĝantaro, 1965) eldonita 7 februaro de la Population Reference Bureau, 1755 Massachusetts Avenue, N.W., Washington, D.C. 20036, Usono.



okazos en la evoluantaj landoj de Afriko, Azio kaj Latinameriko. Statistiko pri naskoj montras ke neniu el ĉi tiuj landoj ĝis nun atingis efikan redukton en la tradicia alta fekundeco. En la evoluantaj landoj naskofteco ĉiujara varias inter 30 ĝis pli ol 50 en ĉiu milo da enloĝantoj, kompare kun ofteco

pide, registris 4 naskojn kontraŭ ĉiuj 3 mortoj. Je la kontraŭa ekstremo troviĝas Kostariko, kie kontraŭ ĉiu morto okazis 5,5 naskoj. Pro mortofteco de 8,8 kaj naskofteco de 47 ĝis 50 en ĉiu milo, la enloĝantaro de Kostariko duobliĝos en 16 jaroj.

La statistiko pri enloĝantara kres-

**15 milionoj beboj mortas ĉiujare antaŭ ol fariĝi unujara. La infanoj pro malsato ekhavas dikajn ventrojn, ili lekas la fingrojn kaj perdas la vidkapablon.**

**N-ROJ 3 KAJ 4 DE "KONTAKTO" PROKRASTIĜIS**  
pro ŝanĝo de la redakta-administra grupo dum 1966.  
Ni pardonpetas pro la malfruo kaj certigas, ke ĉiuj  
J-MA, MA-K kaj abonantoj ankoraŭ ricevos la  
plenan nombron da numeroj.

## DAŬRE PLIMULTIĜAS

Je la alia flanko de la bildo, lastatempa studo montras ke en neniu antaŭa jaro okazis tiom da antaŭenpaŝoj pri limigo de enloĝantaro kiel en 1965. Registaroj preterpaŝis simplan aprobon de nasklimigaj projektoj: ili asignis al tiu laboro valorajn homajn rimedojn kaj eksterlandan valuton. Kvankam la periodo de planata fekundeca malaltiĝo ankoraŭ ne komenciĝis, okazis eta eksplodo de pozitivaj ekpaŝoj.

Oficialaj nasklimigaj programoj estis starigitaj laŭ konstanta bazo en 1965, en Koreo kaj la Respubliko de Ĉinio (Tajvano). Tiuj programoj baziĝis sur uzado de entera limigilo (EUL). El 1.750.000 virinoj en Tajvano aĝaj inter la jaroj 20 kaj 44, proksimume 100.000 akceptis la limigilojn.

Hindio buĝetis ĉirkaŭ \$ 200 milionojn (po 8,3 cendoj por ĉiu persono) elspezotajn dum la venontaj kvin jaroj por nasklimigaj aktivecoj. La unuajara celo estas unu miliono da enmetoj de EUL-oj. La 1-an de julio 1965 Pakistanio akceptis kvinjaran planon de 300 milionoj da rupioj (12 cendoj por ĉiu persono) por sia nasklimiga programo.

Nacia nasklimiga programo komenciĝis en Tunizio en januaro 1966. Nasklimigaj klinikoj aldoniĝas al ekzistantaj medicinaj instalaĵoj, cele al enmeto de po 60.000 EUL-oj jare — t.e. po unu EUL jare kontraŭ ĉiuj 12 virinoj de naskpova aĝo. En subsahara Afriko, Gano starigis komisionon respondecan al la Prezidenta Oficejo. La unuaj rekomendoj de la komisiono ĉefe pritraktas normalan demografian enketadon, la kutiman anstauŝtadon al pli klara konscio pri naskoecaj problemoj. En Latinameriko, precipe Ĉilio, aferoj rapide evoluas. En tiu lando volontula nacia komitato ricevis la oficialan subtenon de la Nacia

Sana Servo, kiu kontribuas kuracistojn, flegistojn kaj akuŝistojn.

Esplorado pri EUL-oj estas konsiderinda, kaj preskaŭ ĉiuj hospitaloj de Santiago nun liveras nasklimigilojn.

En Sansalvadoro, surloka fekundeca studo ĵus kompletigis — la unua tia programo sub egido de memstara registara instanco en Latinameriko. Ekvadoro nun faras similan esploron. Oni starigis du demografajn esplor- kaj edukcentrojn en Kolombio, kaj Peruo kaj

Venezuelo decidis dum 1965 fondi demografajn komisionoj interne de siaj Ministerioj pri Sano.

La studo de ĉi tiuj aktualaj agadoj estis farita de d-ro John A. Ross.

El: Survey of International Development, 15 februaro 1966

Eldonita de: Society for International Development, 1346 Connecticut Avenue, N.W., Washington, D.C. 20036, Usono.

Tradukis: H.T.

## ERARVAGANTOJ EL GLACIMARO

### Balenoj en la Rejno

La blanka baleno, kiu en junio 1966 naĝis en la Rejnrivero ĝis Bonn, baptita de la nederlandanoj "Willy de Waal" kaj de la pli literaturemaj germanoj "Moby Dick", estis ne nur sensacio, sed ankaŭ konfirmis pli fruajn raportojn pri erarvagantoj en la Rejno kaj aliaj eŭropaj riveroj. Feliĉe la menciita baleno ne nur eskapis siajn obstinajn persekutantojn, sed ankaŭ — escepte de maldikiĝo — ne malsaniĝis pro la malpurega riverakvo kaj retrovis la vojon al sia hejma maro. Dum tagoj la inteligenta besto (Beluga-baleno) ĉagrenis la kaptemajn ĉasistojn, ĉar ili neniel sukcesis ankaŭ nur proksimiĝi al sia celo.

"Jen en la Elbe naĝas krokodilo, kial do ĉi tie kaj kial ne en Nil?" Tiel oni kantis antaŭ la unua mondmilito en Hamburgo, ĉar fakte tiam krokodilo naĝanta en la Elbe-rivero dum tagoj estis ĉeftemo de Hamburgaj konversacioj. Tamen la reptilio ne venis rekte el la Nilo, sed el iu zoologia ĝardeno aŭ cirko. Aliaj bestoj kiel fokoj pli ofte, laste en 1961, venis ĝis Hamburgo. Eble ankaŭ estis foko, kiun oni observis la 19an de aŭgusto 1958 en la Rejno apud Koblenz (Germanio)?

Eĉ rosmaroj erarvenis el sia hejma arktika maro ĝis la bordoj de Eŭropo, ekz. oni konstatis rosmaron dum vintro 1926/27 en la havenirejo de Den Helder (Nederlandoj) kaj en somero 1960 antaŭ la insulo Sylt aperis rosmaro, al kiu bone plaĉis ĝis kaptis ĝin fokĉasisto. Rekordoj estis, kiam en 1634 oni kaptis fokon apud Dresden (Germanio) kaj kiam foko naĝis eĉ ĝis la bohemia limo (1813).

Ankaŭ la kazo ke baleno riskis naĝi en rivero, ne estas nova. En 1689 baleno venis ĝis Worms (Germanio), kie oni admiris la "marmonstron". En 1863 oni kaptis Beluga-balenon en la rivero Yukon (Alasko).

Tamen tiaj kazoj estas maloftegaj, temas pri mambestoj oceanaj. Alie estas ĉe birdoj, inter kiuj la "erargastoj" (kiel la zoologoj nomas ilin) estas — kvankam ankaŭ esceptoj — ne tiel maloftaj. Guste dum la lastaj jaroj la ornitologoj registris pli ofte informojn, ke landbirdoj amerikaj venis ĝis Eŭropo kaj inverse. Kun ŝipoj kiel ripozejoj ili sukcesis superi tiujn gigantajn akvovojojn.

## KELKAJ INTIMAĴOJ AL KNABINOJ



Multaj homoj nomas monon la radiko de ĉiu malbono (fakte la Biblio komencis la tradicion). Mi malfacile povas konsenti. En kelkaj rilatoj jes, sed en aliaj ne. Aliaj homoj voĉdonas por fiero. Nu, fiero, kiel baza impulso, kaŭzis kaj kaŭzas pli da malbono en la mondo ol verŝajne iu alia emocio. Nacia fiero, rasa fiero, klasa fiero, memamo — la listo estas senfine longa.

Sed fiero ne ĉiam estas detrua emocio Ĝi kondukas al ambicio, kaj ambicemo, kvankam ofte danĝera, estis la motivo de multegaj grandaj atingoj en la moderna mondo. Ja ni aparte atentigas ke tiu aŭ alia grandulo estas "modesta" homo, aŭ humila homo — tiel indikante ke tiaj homoj estas esceptaj. Kaj fiero ankaŭ kondukas al amo de la patrolando, al amika konkurado, al sinrespekto.

Multaj emocioj ŝajne malbonaj havas sian bonan flankon. Sed nur unu emocio tute ne havas bonan flankon. Tio estas ĵaluzo.

Mi kelkfoje aŭdis amikinojn paroli pri ĵaluzo kvazaŭ ĝi havas meritojn. "Estas ĉiam bone iomete ĵaluzigi knabon," ili diris, "sen iomete da ĵaluzo oni ne povas gajni lian respekton."

Nu, mi kredas tiajn opinion terure danĝeraj. Se oni demandus al mi: "Kio estas la radiko de malbono inter junuloj kaj junulinoj?", mi senhezite dirus ne "Mono" aŭ "Fiero" sed "Ĵaluzo".

La fakto estas klara. Via knabo, via admiranto, ne estas ĵaluzo por flati vin. Li estas ĵaluzo ĉar li sentas sin nesekura aŭ ĉar vi donis al li kialon por ĵaluzo. Estu avertita: ĝi estas paralela inter la emocioj kun la hidrogena bombo inter militiloj. Kaj ĝi havas similajn efikojn.

Pli kaj pli multe, geamantoj bagatele utiligas ĵaluzon kvazaŭ ĝi estas natura parto de la interseksa ludo. Homoj uzas fidelecon kiel armilon — "Estu bonkondata aŭ mi estos malfidela." Sed tiu kuglo facile resaltas kontraŭ la pafinton.

Simpla, tradicia ĵaluzo, la speco kiu kaŭzis tiujn iom ampleksajn problemojn al nia bedaŭrata amiko Otelo, ankoraŭ troveblas. Se vi donas al li kialon por suspekti vin, vi meritas la konsekvencon. Sed la komplika aspekto de la afero montriĝas en la fakto ke multaj viroj klopodas esti je la komenco mildaj kaj permesemaj. "Ĉu mi rajtas tagmanĝi kun mia estro?" vi demandas al via amanto. "Kompreneble, jes. Tute ne gravas," li respondas grandanime. Kaj bele vi surpriziĝas la venontan semajnfino kiam li komencas ĵeti al vi aludetojn pri la afero. Jes, tre nejuste, sed tiaj situacioj ĉiutage ekestas.

Viro kiu vere freneze ĵaluzemas estas viro kiu timas ke la mondo estas plenkla je viroj pli bonaj ol li. Sed multaj knabinoj tute kapablas ami unu viron kaj flirti kun tutaj eskadroj da aliaj. Se vi eniras tiun kategorion, informu vian amanton antaŭe. Aliaze li rapide fariĝos nur amato — ne amanto.

Ĵaluzo viro ne konfesos sian ĵaluzon. Li simple fariĝos pli kaj pli posedema, aŭ pli tiraneca, aŭ troe atentema pri via bonfarto.

Kaj tio povas konduki al tragedio. Mi havas amikon kiu konstante suspektis kaj priĵaluzis sian knabinon senkaŭze. Li neniam amuziĝis ĉe festoj, ĉar li pasigis la tutan tempon spionante pri ŝi. Ŝi tute simple pasigis agrablan tempon, estis viveca, kaj igis sin agrabla.

Sed li suspektis pli ol tio. Kaj okazis ke li renkontis knabinon. Ŝi ankaŭ tute simple pasigis agrablan tempon, estis viveca kaj igis sin agrabla. Sed li, kiu ne povis rekoni tiun sensignifan manieron ĉe la propra knabino, kredis ke ŝi freneze amas lin. Kiel foje okazas sub tiuj cirkonstancoj, li baldaŭ ekreĉiprokis, samtempe forlasante la antaŭan knabinon.

Kompreneble, li baldaŭ eltrovis ŝian mankon de intereso pri li. Sed la antaŭa knabino ankaŭ ne plu interesiĝis. Nun li sidas hejme asertante ke virinoj senvaloras.

(daŭrigo p. 12)



## DRAMO ĈIRKAŬ TELEFONO

kun la klasika Trio  
Petro — Arlekeno — Kolombina

Ĉe la telefono,  
"Petro, aŭdu min!  
Temas nur pri mono;  
mi bezonas ĝin.  
Aŭdu mian krion  
el la marmelad'!  
Mi repagos ĉion  
fine de l'monat'!"

Ĉe la telefono  
nia Arleken'  
staris kiel ŝtono,  
same sen kompren',  
sed laŭtiĝis — ne tro —  
voĉ' de Kolombin',  
kiu flustris: "Petro,  
mi atendas vin!"

Ĉe la telefono  
Petro mokis: "Ĉi  
tie Odeono  
dudek tridek tri.  
Ŝajnas do eraro;  
mi ne konas vin.  
Pruntu de najbaro  
aŭ de najbarin'!"

Ĉe la telefono  
ruze Arleken'  
ĵuris: "Je dispono  
via, ĝis maten'!"

...  
Jam post horduono  
kornojn plantis li  
al la Odeono  
20-33!

## JEN NIA GRUP'!

En nia grup' la prezidant'  
dikiĝis kiel elefant',  
tiom, ke li povas tut-  
sola plenigi la butikon,  
eĉ se ni ne havas publikon!

Kaj nia grupsekretari'  
neniam aŭdis ion pri  
organizo de l'movad',  
sed kompetentas pri aranĝo  
de ĝoja trinkado kaj manĝo.

En nia grupo la kasist'  
rekolektadas kun insist'  
la kotizojn de l'membrar'.  
Tiel al li, dum postaj jaroj,  
neniam plu mankos cigaroj.



En nia grup' la kursgvidant'  
estas polica adjutant'.  
Rimarkinde estas, ke  
anstataŭ la akuzativon  
li uzas nur aperitivon!


En nia grup' dum kursvesper'  
estas nek libro, nek kajer',  
nek lernantoj, ve ho ve!  
La kurso estas — kun aldonoj —  
kompleta en dekdu... bastonoj!

Kaj nia grupbibliotek'  
konsistas el poŝtkartoj dek,  
eble ne tre decaj, ĉar  
temas pri l'fi-zi-o-no-mio  
de l'membroj de l'akademio!

En nia grupo la membrar'  
hodiaŭ nombras dudek kvar,  
sed el ili pli ol dek  
trovas sin en malliberejo,  
l'aliaj en frenezulejo.

Jen nia grup'!





Ĉu vi jam vidis marŝi, paroli, manĝi kaj ridi homon, kies koro dum kelka tempo estis ekster lia korpo? Mi konas tian homon. Mia amiko Petro efektive estis operaciita je la koro kaj devis dum la daŭro de la operacio uzi "arterfaritan koron". Vere, la hodiaŭa medicino — ligita kun la hodiaŭa tekniko — faras "miraklojn".

La progresoj de la kor-kirurgio dum la lastaj du jardekoj apartenas al la plej ekscitaj ĉapitroj de la medicina historio. Ankoraŭ antaŭ 80 jaroj eĉ tiel fama medicinisto kiel Billroth opiniis, ke "ĉiu kirurgo kiu provus kudri vundon de koro, devus perdi la estimon de siaj kolegoj". Hodiaŭ lerta kuracisto povas kudri truon en la korventrikla vando aŭ anstataŭigi korklapon. 20 el la 35 ĝis nun konataj denaskaj kormisformoj estas operacie korekteblaj. La konstanta subtenado de la korlaboro per bateriaj aparatetoj, kiuj indikas al la koro la batritmon, estas aplikata ekz. en Usono ĉe 3000 pacientoj.

Krome oni evoluigis diagnoz-aparatojn, kiuj ebligas ekkoni kormalsanojn ne nur tuj sed ankaŭ longe antaŭ la graviĝo de la malsano.

Niaj fotoj ilustras kelkajn el tiuj modernaj metodoj.

1 La aparato en la mano de la kuracisto permesas al la paciento preskaŭ normalan vivon. Pli frue ĉi tiu sinjorino uzis modelon portatan ekstere ĉe la brusto kaj ligitan per maldikegaj dratoj kun la koro (dekstra radiografaĵo); la nova modelo por akcelado de la korbato troviĝas en la korpo mem (maldekstra radiografaĵo).

2 Sub bild-kontrolo oni kondukas katetron (tubeton) tra gambaĵo en la korventriklon por diagnozi kormalsanon.


3 Artefaritaj korpatoj kaj sangotuboj. En la mano de la kirurgo aort-klapo, maldekstre (ringo kun kuglo) mitralklape.

4 Eta televidilo projekcias mezurojn de instrumentoj, kiuj registras fiziologiajn funkciojn de la

## ESPERO POR MALSANAJ KOROJ

paciento dum la operacio, sur diafan-spegulon antaŭ la okulo de la kuracisto.

Tiel li daŭre povas kontroli la far-ton de la paciento sen forrigardi al la instrumentoj mem.



multaj knabinoj pensas ke ili ne povas ami se ili ne ĵaluzas. Ĉar mankas al ili pli sana ekscito en la interrilato, ili gajnas ĝin per tiu rimedo. Virinoj emas iĝi neracie ĵaluzaj fronte al ĝenerala konkurenco. Knabino kiu vidis sian amaton en konversacio kun tri etaj belulinoj ĉe festo, preskaŭ senescepte surverŝos sur lin la plej buntajn insultojn kaj akuzojn poste. Sed viro kiu vidas sian knabinon en simila konversacio kun tri viroj, neniel maltrankvilas — krom se li havas kialon pro antaŭaj spertoj. La kaŭzo de tio estas la fakto ke virinoj ĉiam havas pli malaltan opinionon pri aliaj virinoj ol viroj havas pri aliaj viroj.

■ Vi eble trovos viron kiu sentas grandan bezonon iĝi **vin** ĵaluza. Li kredas ke tiumaniere vi estas konstante instigata atenti pri li (li pravas) kaj ke ĝi igas lin des pli dezirinda (li ne pravas).

Tia homo bezonas konstantan konfirmon ke li estas inda amricevanto; ĵaluzo estas lia ŝlosilo al la amo. Anstataŭ esprimi sian daŭran kaj grandan amon per pretendoj kiel "Mi grimpos la plej altajn montojn por vi", li klopodas indiki ke se vi promesas ami lin, li promesos freneze ĵaluzi pri vi dum la cetero de la vivo. Li kredas

ke ĵaluzo plaĉas al vi, kaj ke ĝi igas vin konstante esprimi vian amon. Al ĉio ĉi ekzistas nur unu respondo: Adiaŭ.

■ Tio kio veras pri vira ĵaluzo egale valide aplikiĝas al virinoj. Sed kontraste al viroj, kiuj emas ne indiki ke ili estas ĵaluzaj, prefere lasante ĝin putri interne, ni knabinoj pli malfacile rezignas pri la propra fiero. Ni emas esprimi ĝin. Eksplode. Ĵaluza viro ploras en sian bieron. Ĵaluza virino krias kaj sakras kontraŭ sia viro. Kaj

■ En Utopio neniu ĵaluzos pri aliaj homoj kaj neniu havos kialon por ĵaluzo — sed ĉar vi ankoraŭ loĝas en Liège aŭ Yokohama aŭ Perth, estu singarda. Ne estas **amuze** ĵaluzigi lin, kiel pensas multaj knabinoj. Ne temas pri **flatado** kiam li ĵaluzas pri vi, kiel pensas la ceteraj knabinoj. Kiam ekkomencis vera amo, la ebleco perdi lin estas tute ne amuza afero, sed tre serioza. Ne ludu kun ĵaluzo. Se vi volas ekzerci vian povon super li, iom da milda francumado estas miaopinie la plej bona kaj efika preskribo.

Junulino

# HEROLDO

## DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 47 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 18 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: 4 \$ (55 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1


Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

# LA PLEJ KONATAJ


# TRAFIK - AVIADILOJ



Boeing 707



Boeing 727



Caravelle




Douglas DC-8



Convair Metropolitan




Convair Coronado




Vickers Viscount




Vickers VC-10



De Havilland Trident



Fokker Friendship



Iljuschin 18

*tipo*

*m longa*

*seĝoj*

*rapideco km/h*


Boeing 707 .....	46,6	148	900
Boeing 727 .....	42	96	930
Caravelle .....	32	72	830
Douglas DC-8 .....	45,9	145	930
Metropolitan C .....	24,1	48	400
Coronado C. ....	42,4	110	950
Viscount 814 .....	26,1	64	540
Vickers VC-10 .....	48	115	1000
Trident .....	34,9	95	975
Fokker F 27 .....	23,5	40	450
Iljuŝin 18 .....	35,7	89	650

# LA CIRKO MORTIS - VIVU LA CIRKO



Antaŭ kelkaj jaroj oni asertis: la cirko mortas. Tiu aserto ne estis tute malgusta, ĉar efektive bankrotiĝis iom post iom ĉiuj malgrandaj kaj privataj cirkoj. Sed la cirko pluvas, ne nur ĉar oni komencis subvencii (ŝtate) cirkojn aŭ malgrandaj cirkoj fandiĝis kun grandaj, sed ĉefe ĉar ĉiam ekzistas idealistoj, kiuj ne hezitas preni sur sin la duran vivon de cirkulo. Kaj fine, restis la fascinego de la cirka atmosfero, tiu miksiĝo el sensacio, homa rekordakrobateco, kuraĝego kaj mortorisko, belaj kaj sovaĝaj bestoj, bonhumoro kaj nervostreĉo, eleganteco kaj best-odoro. Iomete respegulu ĉi tiun atmosferon niaj bildoj. La mallertaj-lertaj simioj ĉiam povas esti certaj pri aplaŭdo, ĉar la homoj iel ekkonas sian propran neperfektecon per la homsimi(l)aj komik-movoj. Ŝnurdancado estas

(daŭrigo sur p. 18)



# MOZAIKO

## Kaktoj sen dornoj

En Galileo en la lastaj jaroj oni sukcesis kulture diversajn kakto-specojn sen dornoj, por nutrado de ŝafoj kaj kaproj. La kaktoj, kiuj enhavas multege da vitaminoj, tute ne bezonas akvumadon. La rezultoj de tiu eksperimento estis tre kontentigaj, kaj oni nun jam planas planti la kaktojn sur grandaj areoj da neplugebla tero.

(Laŭ Unesco Features  
kaj Informa Servo de UEA)

## Ĉu vi ŝvitas?

Por mallonga tempo **nevestita** homo povas elteni 200° C, sen suferi ian damaĝon; havante **ŝirmvestaĵojn** li eltenas eĉ pli altan varmegon. Tion rezultigis usonaj eksperimentoj. Cetere en la konataj ŝvitbanejoj (saŭno) ankaŭ estas temperaturoj ĝis 100° C.

## Nobla familio

Patro havis sep filojn. La unua estis nutraĵfabrikisto kaj ankaŭ la dua venenis multajn homojn dum la milito. La tria estis politikisto ĉielartifika kaj ankaŭ la kvara filo estis konata imposttrompanto. La kvina estis bankisto kaj sidas kun la sesa en la sama karcereto. La sepa kaj plej juna filo estas ankoraŭ fraŭlo — kiel lia patro.

## Stranga orelo

La plej fama eĥo estas la tielnomata Orelo de Dionizo en Sirakuzo. En tiu kaverno la susurado de papero sonas kvazaŭ maŝinpaŝado. Flustritan vorton la vandoj redonas laŭte kaj klare.

## Komisiono

Neniu komisiono ellaboras ion, se ne hazarde nur estas tri membroj, el kiuj unu estas malsana kaj alia malhelpita. Spertulo

## Plej mensoga

"Vi ne disputu, karaj infanoj," diris la instruisto, kiam li renkontis sur la korto grupon de sovaĝe kriantaj lernantoj. "Pri kio do temas?" "Estas jeno," diris unu, "ni volas do-

naci ĉi tiun hundeton al tiu kiu diras la plej grandan mensogon. Ĉiu el ni asertas, ke li pleje mensogas — sed fakte estas mi!" "Sed infanoj," riproĉis la instruisto, "kiam mi estis en via aĝo, mi eĉ ne sciis kio estas mensogo." "Jen, sinjoro instruisto, la hundeto apartenas al vi!"

## Stilstrangaĵoj

Kiam regis la interdikto pri Anglujo, la papo ĉesis dum unu jaro ĉiujn nasokojn, mortojn kaj geedziĝojn.

Kelkaj bovinoj estas tre danĝeraj, precipe la taŭroj.

La hepato situas sude de la stomako.

Retorika demando estas demando, kies respondo oni ne atendas, ekz.: Kion faris la ĉefministro dum la multaj, multaj jaroj?

En Nederlando la homoj uzas la akvoŝarpon por rotaciigi siajn ventmuelilojn.

La enloĝantojn de Parizo oni nomas parizitoj.

(Laŭ "Howlers" de Cecil Hunts)

## Korupto

Okaze de la Panama-skandalo deputito en la franca parlamento longe kaj larĝe paroladis pri koruptado. Li parolis kaj parolis sen trovi finon. "He!" vokis raŭkvoĉe iu el la aŭskultantoj, "ĉu vi opinias ke eĉ nur unu ĉi tie ne scias, kio estas korupto?"

## Komplimento

Angla politikisto vizitis Germanion. Dum la bankedo je lia honoro germana parlamentano faris paroladon en la angla lingvo. Kiam li finis, la gasto ekstaris kaj diris: "Mi sentas tre feliĉa en lando, kies lingvo tiel similas al la mia."

## Enket-saĝeco

"Fulmotondro!" blasfemas la sinjoro, "kiel vi povas kuraĝi vekti min matene je la 7a por vendi al mi laĉojn?" La kolportisto ridetas: "Tio estas bone pripensita, sinjoro! Per — cetere tre multekosta — enketo de konata demokopa instituto mi konstatis, ke plej ofte laĉoj ŝiriĝas frumatene."

## Kio estas ... ?

1. Matadoro  
a) aŭto-ĉampiono  
b) arma rango  
c) taŭro-batalanto
2. Obelisko  
a) monumento unuroka  
b) optika aparato  
c) filozofia nocio
3. Oblato  
a) helena pastro  
b) maldikega paneto  
c) speco de mambestoj
4. Inkognito  
a) nekonata stelo  
b) maŝino produktanta inkon  
c) kaŝo de identeco de persono
5. Varianto  
a) diferencetaĵo de teksto  
b) ilo por ŝanĝi kolorojn de poŝlampoj  
c) vaganta kantisto

## Ĉu vi estus bona ĵurnalisto?

1. Kiu estas ministro-prezidanto de Francio?
2. Kiujn tri nomojn havas la insulo regata de Ĉiang Kaj-ŝek?
3. Tri ŝtatoj en la mondo havas proksimume 100 milionojn da enloĝantoj. Kiuj?
4. En tri landoj, kie dum jaroj oni ne militas, popoljuro ne regas paco sed nur batalhalto. En kiuj?
5. Ordigu jenajn tri landojn laŭ ilia teritoria grandeco: Okcidenta Germanio — Finnlando — Madagaskaro.
6. Kiu aŭ kio estas Kamĉatka?
7. Kiom da jaroj regadis Ludoviko XIV: 71 — 43 — 17 jarojn?
8. Al kiu ŝtato apartenis Alasko, antaŭ ol ĝin ekposedis Usono?
9. Kiu estas la plej granda firmao de la mondo?
10. Kiom da sekundoj estas la mondrekordo 100-m-kura?

Se vi povas ĝuste respondi 8 el la 10 demandoj, vi estus tre bona, se 5 bona, se malpli netaŭga ĵurnalisto.



Jen la respondoj:

1. Pompidou 2. Formoso — Tajvano — Nacia Ĉinio 3. Japanio — Pakistano — Indonezio 4. Germanio — Israelo — Koreo 5. Madagaskaro — Finnlando — Okc. Germanio 6. Duoninsulo en orienta Siberio 7. 71 jarojn 8. Ruslando 9. General Motors 10. 10,0 sekundoj.

## Solve de Kio estas ... ?

1c, 2a, 3b, 4c, 5a.







(daŭrigo de p. 14)

unu el la plej malnovaj kaj ankoraŭ plej ŝtataj akrobataĵoj ("Renz-Traber"-grupo). Cirko sen ĉevaloj estus kiel supo sen salo (pola dresistino). La pezegaj elefantoj mirigas pro delikataj sentoj kaj inteligenteco, same inteligentaj estas delfenoj. Neimageblajn korpopozojn oni sukcesas prezenti nur post longjara ekzercado. La du ĉinaj ĵonglistoj dancigas 15 telerojn samtempe sur aro da tabloj. Eleganteo plus akrobateco ĉiam bone impresas, kiel ekzemple balerino sur la ora biciklo (Lily Yokoj, Japanio).

## APERIS DUA ELDONO


de la 6-lingva (angla, franca, germana, hispana, japana, rusa) 10-paĝa faldfolio por informado en universitataj medioj.

Trafa, serioza enhavo.

Subskriboj de 75 profesoroj en 27 landoj.

Prezo: po 0,07 gld.

Mendu ĉe la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.



## Perantoj de KONTAKTO

**Argentino:** s-ro J. C. Milkusch, Sarmiento 3298, OLIVOS (330 pesoj)  
**Aŭstralio:** s-ro K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, MELBOURNE, Vic.  
**Aŭstrio:** s-ro F. W. Rentmeister, A 1150 WIEN XV/101, Kauergasse 1/1 St. 2, Stg. 15 (58,— Sch.)  
**Belgio:** s-ro François Schellekens, Frans Hensstraat 44 c-10-3, ANTWERPEN (115 b.fr.)  
**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-II, RIO DE JANEIRO (3400 kruz.)  
**Britujo:** Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., LONDON, W.11 (16/— ŝil.)  
**Bulgario:** s-ro Simeon Simeonov, G. Genov 22, SOFIA-C (2,— lv.)  
**Ĉeĥoslovakio:** s-ro Egon Moravec, U družstva Ideál 11, PRAHA 4-Pankrác (32 Kčs)  
**Danlando:** s-ro Søren Andresen, Friggsvvej 10 st.tv., FREDERICIA (15,50 d.kr.)  
**Finlando:** s-ro Joel Vilkki, SOMERO (7,10 f.mk.)  
**Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 34 rue de Chabrol, PARIS 10 (11 NF)

**Germanio (FRG):** s-ro Reinhard Heupenthal, 6603 SULZBACH 1, Am Bahndamm 12 (8,90 g.mk.)  
**Germanio (GDR):** s-ro Hans Eichhorn, 83 PIRNA, Großsedlitzer Str. 54 (8,90 MDN)  
**Greklando:** s-ro S. Sakellaropulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, ATHINE (66 dr)  
**Hispanio:** s-ro R. Molera, Sta Joaquina de Vedruna 13, MOYA, Barcelona (135 pes.)  
**Hungario:** Hungara Esperanto-Junularo, Kenyérmező u. 6, BUDAPEST VIII (52,— ft.)  
**Irlando:** s-ro J. Addis, Kingstone House, Ballinteer, DUBLIN 14 (16/— ŝil.)  
**Islando:** Federacio de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, REYKJAVIK (93,— i.kr.)  
**Israelo:** s-ro J. Ben Alter, P.O.B. 379, PETAH TIKVA (6,70 isr.pd)  
**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1400 lr.)  
**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyô-ku, TOKIO (800 enoj)  
**Jugoslavio:** s-ino Emilja Lapenna, Nova Ves 32/III, ZAGREB (2000 din.)

**Kanado:** s-ro W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., TORONTO 7, Ont. (2,40 dol.)  
**Kongo:** Konga Esperanto-Instituto, B.P. 7579, LÉOPOLDVILLE  
**Koreo Suda:** s-ro Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, SEOUL  
**Madagaskaro:** s-ro Eugène Raveloson, B.P. 1678, TANARIVE (300 f.mg.)  
**Maroko:** s-ro René Cagnon, 19 rue Pierre Parent, RABAT (11 DH)  
**Meksikio:** s-ro F. Azorin, Str. Gualdalquivir 41-E, MEXICO 5 D.F. (28,— pesoj)  
**Nederlando:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM-2 (8,— gld.)  
**Norvegio:** s-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn 118a, OSLO-Bryn (16,— n.kr.)  
**Novzelando:** Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, P.O. Box 181, UPPER HUTT (16/— ŝil.)  
**Pollando:** s-ro Marek W. Pietrzak, ul. Francuska 5a/3, WARSZAWA (55 zl.)  
**Portugaliao:** s-ro José Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4 dto., LISBOA (4,— esk.)  
**Rumanio:** s-ro Florin Carages, Popa Petre 28, BUCURESTI-9 (32 lejoj)  
**Sovetunio:** s-ro A. E. Gončarov, p.k. 11, BARNAUL 99 (2,50 rbl.)  
**Sudafrika:** s-ro Colin Beckford, P.O. Box 10516, JOHANNESBURG (1,60 rnd.)  
**Svedio:** Sveda Esperanto-Federacio, Specialkonto, MALMÖ (11,50 s.kr.)  
**Svislando:** s-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, 8590 ROMANS-HORN (9,70 s.fr.)  
**Urugvajo:** d-ro R. Zeballos Morales, FRAY MARCOS (Florida) (50,— pesoj)  
**Usono:** s-ro D. E. Parrish, 328 West 46 St., LOS ANGELES, Calif. 90037 (2,25 dol.)  
**Venezuelo:** s-ro L. Moulines, Apartado del Este 4845e CARACAS (10,— bol.)

### ESTRARO DE T.E.J.O.

**Ivo Osibov**, prezidanto, Splitskog odreda 15, Split, Jugoslavio  
**Humphrey Tonkin**, ĝenerala sekretario, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono  
**Roman Dobrzyński**, vicprezidanto, organizaj demandoj, ul. Garwońska 14/64, Warszawa-44, Pollando  
**Ulrich Lins**, vicprezidanto, regiona agado, "Kontakto"; Gemarkenstr. 146, 5 Köln-Dellbrück, Germanio  
**Vilmos Benczik**, kasisto, Emilia u. 23, Budapest XIV., Hungario  
**Hans Bakker**, eksteraj rilatoj, Kastelenstraat 231, Amsterdam Z., Nederlando  
**Dimitr Jdrakov**, kulturaj aferoj; p.k. 1361, Sofia-C, Bulgario  
**Andrzej Pettyn**, lerneaj aferoj; ul. Kościuszki 24, Milanówek k/W-wy, Pollando  
**Yoshimi Umeda**, studentaj aferoj, agado en Azio kaj Oceanio; ĉe Omoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanio

### LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.

**ARGENTINO:** Ruben Feldman Gonzalez, Bv. Oroño 866, Dpto. A, Rosario  
**AŬSTRALIO:** Daniel Kane, 5/55 Hardwick Street, North Melbourne  
**AŬSTRIO:** Hans Michael Maitzen, Mozartgasse 4, Graz  
**BELGIO:** Ivo Durwael, Dolfijnstraat 77, Antwerpen  
**BRITIO:** Peter Kelton Groves, 2 Edwina Gardens, Ilford, Essex  
**ĈEHOSLOVAKIO:** Blanická 4, Praha 2)  
**FRANCIO:** JEFO, 34 rue de Chabrol, Paris X  
**GERMANIO:** U.J. Moritz, Hafenstr. 75, 44 Münster  
**HISPANIO:** Salvador Araĝay, Arce 8-2-4, Cornella, Barcelona  
**HUNGARIO:** Kenyérmező u. 6, Budapest VIII  
**ITALIO:** Via Po, 7, Torino  
**JAPANIO:** Hongo 2-2-14, Bunkyô, Tokio  
**JUGOSLAVIO:** Dobrinjska 12, Beograd  
**KOREO:** Taekeng Kim, Seoul Myoung-Ji College, Seoul  
**MADAGASKARO:** B.P. 1678, Tananarive  
**NEDERLANDO:** Robert Groeneveld, Makassarstr. 112, Amsterdam-6  
**NORDAMERIKO:** Pat Shell, 2535 Millegass, Berkeley, Calif. 94705  
**NOVZELANDO:** P.O. Box 181, Upper Hutt  
**POLLANDO:** ul. Nowy Swiat 27, Warszawa  
**SVEDIO:** Ingrid Carlsson, Lindbergsg. 4, Sundsvall  
**SVISLANDO:** Tazio Carlevaro, Viale Stazione 23, 6500 Bellinzona

KOLEKTU LA ELDONSERION

# ORIENTO-OKCIDENTO

eldonatan sub aŭspicio de UEA

## LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA STONO**, sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 11,50 gld.; broŝ. 8,50 gld.
2. **RAKONTOJ DE OOGAI**, kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyô-dayû". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.
3. **LA NAŬZO**, eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplorvagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 11,70 gld.
4. **KALEVALA**, la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj herooĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humuro. Monumenta, 30-jara traduko de J. E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,— gld.
5. **MARTÍN FIERRO**, iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rim-versa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.
6. **REĜO LEAR**, unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio, K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 16,50 gld.; broŝ. 14,— gld.
7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO**, de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, pasion kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.

Krome, eksterordinara eldono en la serio:

**LA DIA KOMEDIO**, de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita, 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 36,— gld.

Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj

Ĉiuj mendeblaj rekte ĉe la libro-servo de U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando